

ZRZETZENIE STUDENTŲ WYDZIAŃ
Kolegiumo...
ul. Stowackiego...

Varma Gratulo al Oficiala
Subskribo de la Pariza Interkonsento
pri la Vjetnama Problemo

Aldono al n-ro 4, 1973

El Popola Ĉinio

Ĉinaj Partiaj kaj Ŝtataj Subskribon de la Par Vjetnama

Kamarado Ton Duc Thang,
prezidanto de la Vjetnama Demokratia Respubliko,

Kamarado Le Duan,
la unua sekretario de la Centra Komitato de la Labora
Partio de Vjetnamio,

Kamarado Truong Chinh,
prezidanto de la Konstanta Komitato de la Nacia
Asembleo de la Vjetnama Demokratia Respubliko,

Kamarado Pham Van Dong,
ĉefministro de la registaro de la Vjetnama Demokratia
Respubliko,
Hanojo.

Lia Ekscelenco Nguyen Huu Tho,
prezidanto de la Prezidentaro de la Centra Komitato
de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio,

Lia Ekscelenco Huynh Tan Phat,
prezidanto de la Provizora Revolucia Registaro de la
Respubliko de Suda Vjetnamio,

Suda Vjetnamio.

Okaze de la oficiala subskribo de la "Interkonsento pri Finado de la Milito kaj Restarigo de Paco en Vjetnamio" en Parizo, ni esprimas, en la nomoj de la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina registaro kaj la ĉina popolo, varman gratulon kaj altan estimon al vi kaj pere de vi al la Labora Partio de Vjetnamio kaj la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, al la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio kaj al la popolo de la suda kaj norda partoj de Vjetnamio.

Gvidantoj Gratulas Oficialan iza Interkonsento pri la Problemo

Por la sendependeco de la patrolando kaj nacia liberigo, la heroa vjetnama popolo, alte tenante la standardon de Prezidanto Ho Chi Minh **“firma decido batali kaj venki”**, faris sangan bataladon kontraŭ la usona imperiismo por pli ol dek jaroj, kaj finfine devigis la usonan registaron subskribi la **“Interkonsenton pri Finado de la Milito kaj Restarigo de Paco en Vjetnamio”**, konsenti retiri en difinita tempo ĉiujn armitajn fortojn de Usono kaj ĝiaj aliancoj kaj konfirmi la fundamentajn naciajn rajtojn de la vjetnama popolo kaj la memdecidan rajton de la popolo de Suda Vjetnamio, kaj rezulte de tio kreiĝis kondiĉoj por la vjetnama popolo solvi sian problemon sen ekstera armita interveno kaj malfermiĝis perspektivo por realigi pacon, sendependecon, unuigon, demokration kaj prosperon en Vjetnamio.

La subskribo de la Pariza Interkonsento estas grava frukto akirita de la vjetnama popolo en sia longa batalo sur la frontoj de milito, politiko kaj diplomatio, granda venko gajnita de la vjetnama popolo en longa persistado en popola milito, sin apogante sur la propraj fortoj kaj pene luktante en malfaciloj, granda venko de la popoloj de la tri hindoĉiniaj landoj en sia unuiĝa batalado kaj ankaŭ komuna venko de la tutmonda popolo, inkluzive de la popolo de Usono.

Koran ĝojon la ĉina popolo sentas pro la venko de la vjetnama popolo, same kiel pro sia propra. La obstina revolucia spirito kaj la sentima heroismo, kiujn vi montris en la longa rezistmilito, gajnis admirojn kaj laŭdojn de la popolo de la tuta mondo. Via brila ekzemplo pravas ke malgranda lando povas venki grandan, malforta lando povas venki fortan, kaj forte inspiras ĉiujn subprematajn naciojn kaj popolojn de la mondo en ilia kontraŭimperiisma revolucia batalo. Viaj brava batalo kaj granda venko estos skribita en la historio kiel brila modelo de naciliberiga milito de la nuna epoko.

Ĉinio kaj Vjetnamio estas intimaj najbaroj kun komunaj montoj kaj riveroj. En sia longa kontraŭimperiisma batalo, niaj du popoloj ĉiam subtenis kaj kuraĝigis unu la alian kaj starigis profundan revolucionan amikecon. La ĉina popolo ĉiam rigardas vian batalon kiel sian propran kaj rigardas la subtenon al via justa afero kiel sian plenumendan internaciisman devon. Tiel ni faris en la pasinteco dum via kontraŭusona naciisava milito kaj en la estonteco, ni ankoraŭ staros kune kun la frata vjetnama popolo kaj la aliaj frataj hindoĉiniaj popoloj kaj donos firman subtenon al ilia justa afero.

Ni kore deziras, ke la popolo de Norda Vjetnamio gajnu, sub la gvido de la Labora Partio de Vjetnamio kaj la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, novajn sukcesojn en la afero de firmigo kaj konstruado de la socialisma Nordo. Ni kore deziras, ke la popolo de Suda Vjetnamio sub la standardo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj la Provizora Revolucia Registaro rapide starigu, kune kun la aliaj du politikaj fortoj, diversnivelaĵajn naciajn komisionojn de nacia repaciĝo kaj konkordo, faru ĝeneralan balotadon post interkonsiliĝo, decidu la politikan perspektivon de la Sudo kaj senĉese marŝu antaŭen sur la vojo de sendependiĝo, demokratio kaj nacia unuiĝo. Ni estas profunde konvinkitaj, ke certe efektiviĝos la deziro de la vjetnama popolo pri unuiĝo de sia patrolando kaj certe venkos la justa afero de la vjetnama popolo.

Maŭ Zedong,
prezidanto de la Centra Komitato de
la Komunista Partio de Ĉinio

Dong Bivu,
aganta prezidanto de la Ĉina Popola
Respubliko

Ĝu De,
ĉefkomitatano de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko

Ĝoŭ Enlaj,
ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko

Pekino, la 29-an de januaro, 1973

Prezidanto Maŭ Zedong

Intervidiĝis kun Le Duc Tho

kaj Nguyen Duy Trinh

Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la ĉina popolo kaj prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, intervidiĝis kun Le Duc Tho, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio kaj speciala konsilanto de Ministro Xuan Thuy, estro de la Delegacio de la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko al la Pariza Konferenco pri Vjetnamio, kaj Nguyen Duy Trinh, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de L. P. V., vicĉefministro kaj ministro de eksteraj aferoj de la registaro de V.D.R., en Ĝongnanhaj de Pekino vespere de la 1-a de februaro, 1973.

Kiam kamaradoj Le Duc Tho kaj Nguyen Duy Trinh alvenis en la kabineton de Prezidanto Maŭ akompanate de Ambasadoro Ngo Thuyen, Prezidanto Maŭ esprimis varman bonvenigon al ili kaj firme premis iliajn manojn. Kamarado Le Duc Tho diris varme: Ni venas por esprimi niajn respek-

ton kaj salutojn al vi, Prezidanto Maŭ, kaj esprimi nian profundan dankon al vi kaj la Komunista Partio de Ĉinio, pro la grandaj helpo kaj kuraĝigo donitaj al ni en nia milito kontraŭ usona agreso kaj por naciŝavo. Prezidanto Maŭ diris al la vjetnamaj kamaradoj: Nia helpo estas tre malgranda. Ni devas danki vin. Estas vi, kiu helpis nin. Vi batalis kontraŭ la usona imperismo dum pli ol dek jaroj. Ni ĉiam helpis unu la alian. Prezidanto Maŭ petis kamaradojn Le Duc Tho kaj Nguyen Duy Trinh transdoni liajn salutojn al kamaradoj Ton Duc Thang, Le Duan, Truong Chinh, Pham Van Dong kaj Vo Nguyen Giap kaj la vjetnama popolo.

La intervidiĝon ĉeestis Ĝou Enlaj, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPCĉ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, Ĝang Ĉunkiaŭ, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPCĉ, kaj Gi Pengfej, ministro de eksteraj aferoj.



Prezidanto Maŭ varme manpremas kun kamarado Le Duc Tho.

Prezidanto Maŭ intervidiĝas kun Kamaradoj Le Duc Tho kaj Nguyen Duy Trinh en sia kabineto.



*Prezidanto Maŭ varme
manpremas kun kama-
rado Nguyen Duy
Trinh.*





La gastoj kaj mastroj kune iras en la bankedan salonon.

Vespere de la 1-a de februaro Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj okazigis bankedon en la Popola Halo por varme bonvenigi kamaradojn Le Duc Tho kaj Nguyen Duy Trinh.

La bankedo ĉiam iris en intima kaj solidara atmosfero. Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj kaj Nguyen Duy Trinh respektive faris paroladojn kaj ricevis varmajn manklakadojn de la tuta ĉeestantaro.

Solena Mitingo en Pekino

por Festi la Subskribon

de la Vjetnama Interkonsento

Posttagmeze de la 2-a de februaro, 1973, pli ol 10,000 popolanoj de diversaj rondoj de nia ĉefurbo okazigis solenan mitingon por varme festi la subskribon de la "Interkonsento pri Finado de la Milito kaj Restarigo de Paco en Vjetnamio" kaj la grandan venkon de la vjetnama popolo en ĝia kontraŭsona naciŝava milito.

La mitingon ĉeestis laŭ invito Le Duc Tho, Nguyen Duy Trinh kaj aliaj honoraj gastoj de la Vjetnama Delegacio, Ngo Thuyen, ambasadoro de la Vjetnama Demokratia Respubliko al Ĉinio kaj Nguyen Van Quang, ambasadoro de la Respubliko de Suda Vjetnamio al Ĉinio, kaj aliaj vjetnamaj kamaradoj en Pekino.

La mitingon ĉeestis laŭ invito ankaŭ Samdek Penn Nouth, ĉefministro de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo, S-ino Penn Nouth, Sarin Chhak, ministro de eksteraj aferoj, kaj lia edzino, kaj Generalo Duong Sam Ol kaj lia edzino, Thiounn Mumm, Thiounn Prasith kaj aliaj ministroj de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo.

La mitingon ĉeestis gvidantoj de la Partio kaj registaro kaj respondeculoj de diversaj koncernaj departementoj de nia lando Ĝoŭ Enlaj, Giang King,

Je Gianjing, Ĝang Ĉunkiaŭ, Jaŭ Venjuan, Li Hiannian, Gi Dengkuj, Li Deŝeng, Vang Donghing kaj Hju Hiangkian, Guo Moĵuo, Gi Pengfej, Geng Biaŭ, Fang Ji, Li Kiang, Ĝang Cajkian, Hiaŭ Ginguang, Li Gitaj kaj Vu De.

La mitingon ĉeestis laŭ invito ankaŭ ambasadoroj de diversaj landoj al Ĉinio, alilandaj amikoj kaj specialistoj en Pekino.

La mitingo okazis en la Popola Halo. En la kunvenejo estis du grandegaj sloganoj: "Firman subtenon al la justa afero de la vjetnama popolo kaj la popoloj de la aliaj landoj de Hindoĉinio!" "Vivu la granda amikeco kaj batala unuiĝo inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio!" Kun granda ĝojo la laboristoj, membroj de popolaj komunumoj, komandantoj kaj batalantoj de la teraj, maraj kaj aeraj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, lernantoj kaj kadroj de ŝtataj institucioj esprimis varman gratulon kaj altan estimon al la vjetnama popolo pro ĝiaj grandaj meritoj en la longa rezistmilito.


La mitingon prezidis Vu De, estro de la Revolucia Komitato de Pekino.


Ĝang Ĉunkiaŭ, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPĈ, kaj Le Duc Tho, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la

Labora Partio de Vjetnamio, faris unu post la alia paroladojn plenajn de kunbatala amikeco. Iliaj paroladoj estigis varmajn aplaŭdojn tra la tuta kunvenejo. Post la paroladoj, kamaradoj Le Duc Tho kaj Nguyen Duy Trinh kore brakumis kamaradojn Ĝou Enlaj kaj Ĝang Ĉunkiaŭ.


En la mitingo, la ĉinaj kaj vjetnamaj kunbatalantoj donacis reciproke silkajn flagojn. La silkaj flagoj donacitaj de la mitingo al la heroaj popoloj de la suda kaj norda partoj de Vjetnamio portas respektive jenajn famajn vortojn de Prezidanto Ho Chi Minh: **“Profunda estas la amikeco inter Vjetnamio kaj Ĉinio, kiuj estas kaj kamaradoj kaj fratoj!”** kaj **“Certe unuiĝos nia patrolando. Certe rekuniĝos sub la sama tegmento niaj samlandanoj de la Sudo kaj la Nordo.”** La silka flago al la ĉina popolo donacita de la Registara Delegacio de la Vjetnama Demokratia Respubliko por Intertraktado kaj Subskribado de la **“Interkonsento pri Finado de la Milito kaj Restarigo de Paco en Vjetnamio”**, portas jenan surskribon: **“Longe vivu la amikeco inter Vjetnamio kaj Ĉinio!”** kaj tiu donacita de la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio al la ĉina popolo portas jenan surskribon: **“Unuiĝo, Batalo, Venko!”** Kiam la flagoj estis interŝanĝataj, longdaŭra manklakado tondris en la tuta halo.

La mitingo finiĝis post kantado de *La Internacio*.





La estrado de la mitingo



La mitingo

Parolado de Kamarado

Ĝang Ĉunkiaŭ

Estimata Kamarado Le Duc Tho,
Estimata Kamarado Nguyen Duy Trinh,
Estimata Samdek Penn Nouth kaj S-ino
Penn Nouth,
Estimata Ambasadoro Ngo Thuyen,
Estimata Ambasadoro Nguyen Van
Quang,
Estimataj vjetnamaj gekamaradoj,
Gekamaradoj kaj geamikoj,

Hodiaŭ, popolanoj de ĉiuj rondoj de nia ĉefurbo kun granda ĝojo kolektiĝas en tiu ĉi solena mitingo por festi la subskribon de la "Interkonsento pri Finado de la Milito kaj Restarigo de Paco en Vjetnamio" kaj la grandan venkon de la vjetnama popolo en ĝia kontraŭusona naciŝava milito. En la nomo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉinaj registaro kaj popolo, mi esprimas niajn varmajn fratajn gratulojn al la popolo en Norda kaj Suda Vjetnamio kaj esprimas nian altan estimon al la armeo kaj popolo de Vjetnamio, kiuj faris grandiozan meriton en sia longdaŭra rezistmilito.

Ni estas aparte ĝojaj pro tio, ke Kamarado Le Duc Tho, speciala konsilanto de la Delegacio de la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko al la Pariza Konferenco, Kamarado Ministro de Eksteraj Aferoj Nguyen Duy Trinh kiu subskribis la Parizan

Interkonsenton en la nomo de la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, Ambasadoro Ngo Thuyen, Ambasadoro Nguyen Van Quang kaj la aliaj honoraj vjetnamaj gastoj ĉeestas la hodiaŭan mitingon por festi tiun ĉi grandan venkon kune kun ni. Lasu nin refoje esprimi nian varman bonvenigon al niaj vjetnamaj kunbatalantoj.

La vjetnama popolo faris longajn kaj bravajn batalojn por la sendependeco de sia patrolando kaj la liberigo de sia nacio. En la lastaj dekelkaj jaroj ĝi faris ekstreme penigan batalon kontraŭ la usona imperiismo, montrante sentiman heroismon. Sub la gvido de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio, la popolo de Suda Vjetnamio venkis grandajn malfacilojn, persistis en longdaŭra popola milito, ekstermis grandan nombron da malamikaj vivfortoj kaj liberigis vastajn areojn. Sub la gvido de la Labora Partio de Vjetnamio kaj la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, la popolo en Norda Vjetnamio, unuiĝinta kiel unu persono kaj sentima al vivofero, heroe rezistis kontraŭ la aeraj kaj surmaraj atakoj faritaj de Usono, frakasis ĉiun el ĝiaj "militaj eskaladoj", venke defendis la socialisman

Nordan Vjetnamion kaj donis fortan subtenon kaj helpon al la sang-fratoj en la Sudo en la kontraŭusona nacistava batalo. La usona imperiismo ne povis haltigi la venkan antaŭenmarŝon de la vjetnama popolo, kvankam ĝiaj strategiistoj ellaboris t. n. “specialan militadon”, “lokan militadon”, “vjetnamigon”, ktp. kaj uzis ĉiajn kruelajn rimedojn de agreso. La sentima rezistmilito dum pli ol dek jaroj kaj la sennombraj provoj de batalado montras, ke la vjetnama popolo estas avangardo de la nuntempa naciliberiga batalo kaj meritas la nomon de herooj batalantaj por sendependeco kaj libereco.

Nun la “Interkonsento pri Finado de la Milito kaj Restarigo de Paco en Vjetnamio” estas finfine oficiale subskribita. En la interkonsento, la usona registaro ne povis ne rekoni la fundamentajn naciajn rajtojn de la vjetnama popolo — sendependecon, suverenecon, unuecon kaj teritorian integrecon — kaj rekoni la memdecidan rajton de la popolo de Suda Vjetnamio, konsenti retiri ĉiujn armitajn fortojn de Usono kaj ĝiaj aliancoj en fiksita tempo kaj garantii ĉesigon de ĉiaj militaj aktivadoj kontraŭ Norda kaj Suda Vjetnamio. La subskribo de tiu ĉi interkonsento kreis kondiĉojn por la vjetnama popolo solvi [siajn internajn] problemojn sen ekstera armita interveno kaj malfermis perspektivojn por la realigo de paco, sendependeco, unueco, demokratio kaj prospero en Vjetnamio. Tio ĉi estas grava sukceso gajnita de la vjetnama popolo per longaj bataloj sur la milita, politika kaj diplomatia frontoj. Ĝi estas granda venko, kiun la vjetnama popolo gajnis per alta tenado de la brila standardo de Prezidanto Ho Chi Minh “**firma decido batali kaj venki**”, kaj per la unuigita forto de la tuta nacio, surbaze de memstareco kaj la propraj fortoj kaj persistante en longdaŭra

popola milito. Ĝi estas granda venko gajnita de la vjetnama popolo en firma unuigo kaj ŝultro-ĉe-ŝultra batalado kun la frataj laosa kaj kamboĝa popoloj. Ĝi estas ankaŭ komuna venko por ĉiuj pacamaj kaj justemaj landoj kaj popoloj de la mondo, inkluzive de la usona popolo.

La ĉina popolo varme aklamas la grandan venkon de la vjetnama popolo en ĝia kontraŭusona nacistava milito. Viaj heroaj faroj forte stimulis ĉiujn subprematajn naciojn kaj popolojn de la mondo. Vi starigis per via batala praktiko brilan ekzemplon por la popoloj de la tuta mondo en iliaj kontraŭimperiismaj revoluciaj bataloj.

La venko de la vjetnama popolo en la kontraŭusona nacistava milito vivece pravas, ke ĉiuj justaj aferoj estas nevenkeblaj. Je sia leviĝo kontraŭ subpremo, subpremataj nacioj kaj popoloj estas ĝenerale malfortaj kaj malgrandaj en forto, dum iliaj malamikoj estas fortaj kaj grandaj. Tiel same estis, kiam la vjetnama popolo estis devigata preni armilojn kaj konduki sian sanktan rezistmiliton. Sed ĉar ilia milito estis granda milito por naciliberigo, ilia afero estis tute justa. La popoloj de la tuta mondo staris ĉe ilia flanko. Ili havas altan celon de batalo kaj feras volon batali ĝis la fino; ili estis lertaj en lernado de militado, akumulado de sperto kaj disvolvo de ilia kapablo tra militado; ili grandigis sian forton iom post iom de malgranda al granda dum la longdaŭra rezistado kaj finfine gajnis la grandan venkon de sia kontraŭagresa milito.

La granda venko de la vjetnama popolo ankaŭ pravas konvinke, ke certe fiaskos ĉiu ajn granda lando aŭ granda potenco intencanta perforte trudi sian volon al la popolo de alia lando. Sur la vjetnama batalejo, Usono uzis centojn

da miloj da armeanoj, aplikis ĉiujn specojn de strategioj kaj taktikoj, uzis grandajn nombrojn da modernaj armiloj kaj kemiaj armiloj, elspezis senprecedence grandajn militajn pagojn kaj ĵetis ege pli multajn bombojn ol en ĉiu ajn alia milito en la historio. Sed anstataŭ subigi la vjetnaman popolon ĝi metis sin en senelirejon en- kaj eksterlande. **Malforta lando povas venki fortan, malgranda lando povas venki grandan.** La venka rezistmilito de la vjetnama popolo estas brila ekzemplo de tiu ĉi vero.

Nun, la popolanoj de la tuta mondo aklamas la subskribon de la "Interkonsento pri Finado de la Milito kaj Restarigo de Paco en Vjetnamio" kaj sincere esperas, ke la vjetnama popolo havos de nun veran sendependecon kaj pacon kaj tiel kontribuos por mildigi la streĉecon en la Malproksima Oriento. Sperto diras al ni, ke estas malfacile sukcesigi subskribon de armistika interkonsento, kaj post ĝia subskribo estas ankaŭ malfacile realigi la skribaĵon sur papero. Estas necese, ke ĉiuj koncernaj flankoj faru klopodojn fervore kaj serioze. La registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio ambaŭ solene deklaris, ke ili strikte kaj plene plenumos ĉiujn kondiĉojn de la Pariza Interkonsento. Ni esperas kaj postulas, ke la usona registaro kaj precipe la saĵgonaj aŭtoritatoj ankaŭ rigore observos kaj plenumos ĉiujn kondiĉojn de la Pariza Interkonsento. Tamen ni ne povas ne rimarki, ke en la pasintaj kelkaj tagoj post la pafĉesigo la saĵgonaj aŭtoritatoj daŭrigis siajn militajn aktivadojn por demordeti la liberigitajn regionojn kaj starigis obstaklojn al la funkcio de la Kvar-flanka Kuna Milita Komisiono. Ni opinias, ke tio estas nepermesebla. Ĉiuj aktivadoj malobservantaj kaj sub-

fosantaj la interkonsenton devas esti ĝustatempe ĉesigitaj kaj ĉiuj kondiĉoj de la interkonsento devas esti rigore observataj kaj plenumataj.

Karaj gekamaradoj kaj geamikoj,

La venko de la vjetnama popolo en la kontraŭusona naciŝtata milito jam kreis novan situacion por la socialisma afero en la Nordo kaj por la nacia demokratia revolucio en la Sudo de Vjetnamio. La vjetnama revolucio jam eniris novan etapon. La taskoj alfrontataj de la vjetnama popolo estas ankoraŭ tre penigaj. Ni kredas, ke la vjetnama popolo, kiu estas hardita en sia longdaŭra revolucia milito, certe disvolvos sian revolucion heroismon montritan en la milito, laboros peneme, venkos ĉiajn malfacilojn kaj plenumos la novajn taskojn starigitajn en la alvokoj je la 28-a de januaro publikigitaj respektive de la Labora Partio de Vjetnamio kaj la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio por firmigi la jam akiritajn fruktojn de venko kaj senĉese akiri novajn venkojn.

Ni sincere deziras, ke la popolo en Norda Vjetnamio, sub la gvido de la Labora Partio de Vjetnamio kaj la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, rapide kuracos la vundojn de milito, restarigos kaj disvolvos sian ekonomion kaj akiros novajn sukcesojn en solidigo kaj konstruado de la socialisma Nordo.

Ni sincere deziras, ke la popolo en Suda Vjetnamio, sub la standardo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio, efektivigos nacian unuiĝon kaj faros daŭran progreson sur la vojo de

konstruado de paca, sendependa, demokratia kaj prospera Suda Vjetnamio.

La vjetnama nacio estas integra tuto. Reunuigo de la lando estas la nacia aspiro por kiu la tuta vjetnama popolo longe batalis. La subskribita interkonsento kondiĉis, ke la reunuigo de Vjetnamio estos efektivigita inter Norda kaj Suda Vjetnamio paŝon post paŝo per paca rimedo sen ekstera interveno. Ni estas konvinkitaj, ke per sia unuigita batalado la popolo en Norda kaj Suda Vjetnamio certe venkos la artefaritan splitiĝon kaj realigos la sanktan celon de la paca reunuigo de sia patrolando. Certe venos la bela tago, kiam la Nordo kaj la Sudo **“rekuniĝos sub la sama tegmento”**, antaŭdirita de Prezidanto Ho Chi Minh.

Karaj gekamaradoj kaj geamikoj,

En la hodiaŭa mitingo, ni ĉina popolo kaj la vjetnamaj kunbatalantoj havas komunan senton, nome, niaj du popoloj **“ja estas samfamilianoj”** kaj ni estas **“kaj kamaradoj kaj fratoj”**. Niaj du popoloj, dividantaj niajn zorgojn kaj sorton, kuraĝigis kaj subtenis unu la alian kaj forĝis profundan revolucionan amikecon en la longa kontraŭimperialisma revolucia batalo. Tiu ĉi amikeco inter ni estas persone kulturita de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong kaj la granda gvidanto de la vjetnama popolo Prezidanto Ho Chi Minh; ĝi estas bazita sur Marksismo-Leninismo kaj proletara internaciismo kaj estas firma kaj nerompebla.

La senmortaj meritoj faritaj de la heroa vjetnama popolo en sia longdaŭra rezistmilito estas forta subteno kaj helpo al la ĉina popolo en ĝia socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Ĉiu el viaj venkoj estas granda inspiro

al ni, kaj via revolucia spirito estas ĉiam por ni lerninda. Ni neniam forgesos la valoregan subtenon kaj helpon de la vjetnama popolo al la ĉina. Mi volas preni tiun ĉi ŝancon por esprimi niajn sincerajn dankojn al la frata vjetnama popolo.

La ĉina popolo ĉiam rigardas la batalon de la vjetnama popolo kiel nian propran batalon, iliajn venkojn kiel niajn proprajn venkojn kaj iliajn malfacilojn kiel niajn proprajn malfacilojn kaj prenas niajn subtenon kaj helpon al la vjetnama popolo en ĝia justa batalo por sendependeco kaj libero kiel nian plenumendan devon de proletara internaciismo. En la pasintaj militaj jaroj, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ ke **“la sepcentmiliono ĉina popolo estas potenca apogilo por la vjetnama popolo kaj la vasta teritorio de Ĉinio estas fidinda postfronto de la vjetnama popolo”**, la ĉina popolo firme subtenis kaj helpis la vjetnaman popolon en ĝia kontraŭusona naciisava batalo. En la nova periodo post la fino de la milito, ni restos unuigitaj kun la vjetnama kaj la aliaj popoloj de Hindoĉinio, senŝanceliĝe plenumos nian devon de proletara internaciismo kaj daŭre subtenos kaj helpos la justan aferon de la vjetnama kaj la aliaj popoloj de Hindoĉinio ĝis la gajno de kompleta venko.

Vivu la granda venko de la vjetnama popolo en ĝia kontraŭusona naciisava milito!

Vivu la granda amikeco kaj batala unuigo inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio!

Vivu la granda amikeco kaj batala unuigo inter la popoloj de Ĉinio kaj la tri hindoĉiniaj landoj!

Vivu la heroa vjetnama popolo!

Parolado de Kamarado

Le Duc Tho

Estimata Kamarado Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko,

Estimata Kamarado Ĝang Ĉunkiaŭ, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio,

Estimataj gvidantaj kamaradoj de la ĉinaj partio kaj registaro,

Estimata Samdek Ĉefministro Penn Nouth kaj sinjorino Penn Nouth,

Estimata Kamarado Vu De, estro de la Pekina Revolucia Komitato,

Karaj kamaradoj kaj amikoj de la diplomataro,

Karaj gekamaradoj kaj geamikoj,

En tiu ĉi jubila atmosfero de frateco inter la du popoloj de Vjetnamio kaj Ĉinio, mi esprimas al estimata Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj gvidantaj kamaradoj de la ĉinaj partio kaj registaro, al la tuta popolo de la glora ĉefurbo Pekino kaj al la granda ĉina popolo la

plej altan respekton de batala unuiĝo kaj frata amikeco de la Labora Partio de Vjetnamio, la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj la tuta vjetnama popolo.

Mi esprimas elkorajn dankojn al vi pro tiu ĉi granda mitingo, kiun vi aranĝas, por festi la venkon de la vjetnama popolo, okaze de la subskribo de la "Interkonsento pri Finado de la Milito kaj Restarigo de Paco en Vjetnamio". Mi ankaŭ salutas kaj dankas Samdek Ĉefministron Penn Nouth, Sinjorinon Penn Nouth, kaj ĉiujn gekamaradojn kaj geamikojn kiuj venis ĉi tien por dividi nian ĝojon pri la venko, ĝojon efektive komunan por ni ĉiuj. Mi kore dankas Kamaradon Ĝang Ĉunkiaŭ por lia bona parolado, kiu estas plena de frata amikeco kaj alte taksas la venkojn de ni gajnitajn. Ni konsideras ĝin kiel grandan kuraĝigon al ni en tiu nova etapo de revolucia batalo.

Karaj gekamaradoj kaj geamikoj,

Kiel vi scias, la kontraŭsona naci-sava milito de la vjetnama popolo estas

la plej longa, plej peniga batalo finiĝinta kun granda venko en la historio de nia nacia liberigo. Ĝi estas ankaŭ la plej kruela milito en la historio de nacia liberigo de la subpremataj nacioj tra la mondo.

De 13 jaroj, la usona imperiismo ekspedis plejparton de siaj maraj, teraj kaj aeraj fortoj, inkluzive de preskaŭ miliono da usonaj soldatoj, kaj la pupajn kaj satelitajn trupojn el pli ol miliono da soldatoj, uzis la plej modernajn armilojn kaj militajn rimedojn, aplikis ĉiuspecajn taktikojn kaj strategiojn, kaj elspezis miliardojn post miliardoj da dolaroj por fari agresan militon kontraŭ nia lando. Sed ĉiuj ĝiaj strategioj kaj taktikoj fiaskis kun malgloro kaj ĝi estis devigita intertrakti kun ni por trovi elirejon por la milito. Post preskaŭ kvin jaroj de malfacila kaj intensa traktado, la “Interkonsento pri Finado de la Milito kaj Restarigo de Paco en Vjetnamio” estis fine subskribita en Parizo en la 27-a de januaro, 1973.

Laŭ la interkonsento, Usono promesas de nun respekti la fundamentajn naciajn rajtojn de la vjetnama popolo, nome la sendependecon, suverenecon, unuiĝon kaj teritorian integrecon de Vjetnamio. Ĝi estas devigita ĉesigi sian agresan militon en Vjetnamio, eltiri ĉiujn usonajn kaj satelitajn trupojn, ĉiuspecajn konsilantojn kaj militajn personojn kaj malekipi ĉiujn usonajn militajn bazojn en la suda parto de Vjetnamio. Ĝi promesas ĉesigi ĉiajn militajn involviĝojn kaj intervenojn en la internaj aferoj de la suda parto de Vjetnamio. Ĝi promesas respekti la rajtojn de la sudvjetnama popolo pri memdecido kaj demokratiaj liberecoj. En efektiveco, ĝi jam agnoskas ke en Suda Vjetnamio nun ekzistas la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio kaj, sub ties superregado, la liberiga armeo kaj la liberigitaj regionoj.

La subskribo de la Pariza Interkonsento pri la vjetnama problemo estas la rezulto de la kontraŭusona naciŝava milito de la vjetnama popolo. Ĝi metis politikan kaj juran bazon por la batalo de nia tuta popolo por antaŭenmarŝi plue, batalakiri ankoraŭ pli grandajn venkojn kaj plenumi la nacian demokratian revolucion tra la lando.

Karaj gekamaradoj kaj geamikoj,

La sukcesa subskribo de la “Interkonsento pri Finado de la Milito kaj Restarigo de Paco en Vjetnamio” estas ne nur tre granda venko de la kontraŭusona naciŝava milito de la vjetnama popolo, sed ankaŭ venko de la batala solidareco de la vjetnama, laosa kaj kamboĝa popoloj en lukto kontraŭ sia komuna malamiko. Ĝi estas venko kun epokfara signifo gajnita de la popolo de la socialismaj landoj, de la fortoj de nacia sendependececo, demokratio kaj paco, kaj de ĉiuj pacamaj kaj justemaj popoloj tra la tuta mondo.

Ĝi estas granda venko de la ĝusta linio de la Labora Partio de Vjetnamio persisti en batalo sur tri malsamaj frontoj de milito, politiko kaj diplomatio. Ĝi estas venko de unuiĝo, de firma decido batali kaj venki, de alta tenado de la standardo de la amata Prezidanto Ho Chi Minh “Nenio estas pli kara ol sendependececo kaj libereco”, kaj de eltenado de suferoj kaj oferoj dum pli ol dek jaroj, fare de nia tuta partio kaj popolo. Ĝi estas venko de niaj 21 milionoj da samlandanoj en la Nordo kaj de niaj 17 milionoj da samlandanoj en la Sudo, kies sola vera reprezentanto estas la Naciliberiga Fronto kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio.

Karaj gekamaradoj kaj geamikoj,

La sukcesa fino de la rezistmilito de la vjetnama popolo markas novan turnon

punkton por la vjetnama revolucio. Tamen, tio estas nur unuapaŝa venko. Nia popolo en ambaŭ norda kaj suda partoj ankoraŭ devas fari malfacilan kaj komplikan batalon antaŭ ol ni atingos nian celon konstrui pacan, unuecan, sendependan, demokratian kaj prosperan Vjetnamion. La sudvjetnama popolo ankoraŭ devas konkeri multajn malfacilojn kaj obstaklojn, ĉar la militestroj kaj faŝistaj fortoj — instrumentoj de novkoloniismo — ne volas forlasi sian intrigon subfosi pacan kaj obstrukcii al nia popolo la vojon al sendependeco kaj libereco. Pli ol iam ajn nia popolo en ambaŭ partoj devas plifortigi sian unuiĝon, konservi altan singardemon en ĉiu tempo, kaj pene lukti por solidigi la jam akiritajn venkojn, por konservi longdaŭran pacan, konstrui kaj firmigi la socialisman Nordon, realigi sendependecon kaj demokration en la Sudo, kaj plie efektiviĝi pacan reunuiĝon de la patrolando.

La vjetnama popolo kaj la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko serioze kaj rigore plenumos ĉiujn kondiĉojn de la Pariza Interkonsento kaj postulas ke ankaŭ la aliaj partoprenantoj al la interkonsento respektu kaj plene plenumu ĝin.

La vjetnama popolo kredas ke la laosa popolo sub la standardo de la Laosa Patriota Fronto kaj la kamboĝa popolo sub la standardo de la Nacia Unueca Fronto kaj la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuĝo de Kamboĝo certe akiros brilajn venkojn en siaj rezistaj militoj.

Karaj gekamaradoj kaj geamikoj,

En sia justa batalo, la vjetnama popolo ĉiam ĝuis profundan simpatian kaj grandan subtenon de la popoloj de la frataj socialismaj landoj kaj la pacamaj kaj justemaj popoloj tra la mondo, inkluzive

de la progresema popolo de Usono. Mi prenu tiun ĉi ŝancon por transdoni al ĉiuj niaj fratoj kaj amikoj en diversaj partoj de la mondo koran kaj profundan dankon de la Labora Partio de Vjetnamio, la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj la vjetnama popolo, pere de vi, gekamaradoj, fremdlandaj gastoj kaj geamikoj partoprenantaj en tiu ĉi solena mitingo, pro tiuj altvaloraj simpatioj kaj subteno.

La Vjetnama Demokratia Respubliko kaj Ĉinio estas frataj socialismaj landoj najbaraj. Niaj du popoloj havas longan tradicion de solidareco kaj amikeco. Ĝuste kiel nia estimata Prezidanto Ho Chi Minh diris **“Profunda estas la amikeco inter Vjetnamio kaj Ĉinio, kiuj estas kaj kamaradoj kaj fratoj”**; ankaŭ estimata Prezidanto Maŭ diris **“Ni ja estas samfamilianoj”**. Ni dividis inter ni veston kaj manĝaĵon dum la malfacilaj tempoj de batalo, kaj nun ni dividis inter ni komunan ĝojon en venko. En la pasinta kontraŭusona nacisava milito, la vjetnama popolo ricevis, de la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina registaro kaj la frata ĉina popolo, tre grandajn valorajn subtenon kaj helpon en diversaj flankoj donitajn en la spirito de proletara internaciismo. Tiuj subteno kaj helpo faris gravan kontribuon por la venko, kiun ni akiris. La gratula telegramo sendita en la 29-a de januaro de la gvidantaj kamaradoj de la ĉinaj partio kaj registaro, la parolado de Kamarado Ĝoŭ Enlaj ĉe la hieraŭa bankedo, kaj la parolado de Kamarado Ĝang Ĉunkiaŭ ĉe tiu ĉi solena mitingo multe kuraĝigas nian popolon en la norda kaj suda partoj de Vjetnamio.

En tiu ĉi ĝojplena atmosfero de venko de batala solidareco kaj frata amikeco inter Vjetnamio kaj Ĉinio, mi esprimas, en la nomo de la Labora Partio de Vjetna-

mio, la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj la tuta vjetnama popolo, nian koran kaj profundan dankon al la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina registaro kaj la frata ĉina popolo.

Ni konvinkiĝis, ke en la batalo por konstrui socialismon en la Nordo, efektivi la nacian demokratian revolucion en la Sudo kaj plue pace reunuigi la patrolandon, la vjetnama popolo daŭre ricevos ankoraŭ pli grandan simpatian kaj subtenon de la frata ĉina popolo.

Mi sincere deziras, ke la frata ĉina popolo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kun estimata Prezidanto Maŭ kiel ĉefo, gajnos ankoraŭ pli multe da grandaj novaj venkoj en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj en la efektivigo de la Kvara Kvin-jara Plano.

La batala solidareco kaj frata amikeco bazita sur Marksismo-Leninismo inter niaj du partioj kaj du popoloj daŭre brilu por eterne!

Bonvenon al la Subskribo de la Interkonsento pri la Vjetnama Problemo

Ĉefartikolo de la Popola Ĵurnalo

La 27-an de januaro, 1973, ĉiuj flankoj ĉeestantaj la Parizan Konferencon pri la vjetnama problemo oficiale subskribis en Parizo la "Interkonsenton pri Finado de la Milito kaj Restarigo de Paco en Vjetnamio". La paco en Vjetnamio delonge sopirata de la tutmonda popolo finfine venis konforme al la volo de la vjetnama nacio. Tio estas giganta venko de la vjetnama popolo, kaj ankaŭ de la monda popolo. La ĉina popolo bonvenigas la subskribon de la interkonsento pri fino de la vjetnama milito kaj varme gratulas al la frata vjetnama popolo.

Dum la lastaj dekelkaj jaroj, por oponi kontraŭ la usona agreso kaj gajni patrolandan sendependecon kaj nacian liberiĝon, la kvardek miliona heroo vjetnama popolo, spite al granda nacia ofero, kondukis kun sentima revolucia spirito mondiskuan kontraŭusonon nancisavan militon kaj akiris brilan venkon. Kvankam Usono ekspedis pli ol kvincent mil terajn trupanojn, ekspedis la Sepan Floton inkluzive multajn aviadilajn ŝipojn kaj dek mil aviadilojn, kaj ĵetis preskaŭ ok milionojn da tunoj

da bomboj kaj faris rektan militan elspezon de proksimume ducent miliardoj da usonaj dolaroj, tamen ĝi neniel povis subigi la vjetnaman popolon. Per sia venko la vjetnama popolo forte kuraĝigis ĉiujn subprematajn naciojn en ilia liberiga batalo kaj faris gravan kontribuon por la kontraŭimperiisma afero de la popoloj de la tuta mondo. La justa milito de la vjetnama popolo estos skribita en la historio kiel ekstreme granda naciliberiga milito de la nuna epoko.

Tiu vjetnama milito komenciĝis kaŭze de Usono, kiu rompis la Ĝenevajn Interkonsentojn de 1954 kaj faris intervenon kaj agreson al Vjetnamio, kaj nun finiĝis per tio, ke Usono ĉesigis ĉiujn militajn operaciojn kontraŭ Vjetnamio kaj laŭ la difinita dato retiros ĉiujn siajn militajn fortojn kaj la armeojn de siaj aliancoj. Laŭ la interkonsento subskribita de la kvar flankoj, Usono garantios respekti la sendependecon, suverenecon, unuecon kaj teritorian integrecon de Vjetnamio; Usono prenos sur sin la devon retiri el Suda Vjetnamio ĉiujn armeojn kaj militajn personojn de Usono

kaj ĝiaj aliancoj en 60 tagoj, ne plu involviĝi en militan aktivadon en Suda Vjetnamio, ne interveni en internajn aferojn de Suda Vjetnamio kaj agnoski la memdecidan rajton de la popolo de Suda Vjetnamio; kaj la popolo de Suda Vjetnamio per ĝenerala baloto faros decidon pri la politika perspektivo de Suda Vjetnamio kaj la ŝtata reunuigo de Vjetnamio estos paŝo-post-paŝe efektivigata per paca rimedo. Tiamaniere, la vjetnama problemo povos esti solvita sen ekstera armita interveno. La vjetnama popolo ne domaĝis sangverŝon kaj vivoferon ĝuste por gajni kaj defendi sian fundamentan nacian rajton.

La subskribo de la interkonsento pri la vjetnama problemo ankoraŭfoje konfirmas ke justa afero estas nevenkebla. Justaj estas la militoj de subpremataj nacioj kaj agresataj landoj kontraŭ ekstera agreso por akiri sendependecon kaj liberiĝon. Maljustaj estas la agreso kaj subpremo de hegemoniismo. La subpremataj nacioj kaj agresataj landoj certe povas venki eksterlandan agreson kaj teni sian sorton en la propraj manoj, se nur ili kuraĝas preni armilojn, kunagas unuanime kaj persistas en batalo. Tion plene pruvis la popolaj militoj kontraŭ eksteraj armita interveno kaj agreso post la Dua Mondmilito. Hodiaŭ, tiel en Hindoĉinio, kiel en aliaj lokoj de la mondo, estas nebarebla de ĉiu ajn forto la historia fluo, ke landoj volas sendependiĝon, nacioj volas liberiĝon kaj popoloj volas revolucion. La aferoj de ĉiu ajn lando devas esti solvataj de la popolo de tiu lando mem kaj absolute ne devas esti interveno deekstera. Kaj fiaskos finfine ĉiu intenco kontraŭa al tiu ĉi historia fluo.

La agresa milito de Usono kontraŭ Vjetnamio kaŭzis al la vjetnama popolo kolosajn detruon kaj katastrofon, ankaŭ alportis al la usona popolo multe da suferoj kaj ege intensigis la streĉitan situacion en Azio. Serioze plenumi la jam atingitan interkonsenton, fini la militon kaj restarigi

pacon konformas ne nur al la interesoj de la vjetnama popolo, sed ankaŭ al tiuj de la usona popolo kaj la aliaj popoloj de la tuta mondo. Samtempe, tio certe naskos pozitivan influon al plimildiĝo de la streĉita situacio en Azio kaj la mondo.

Nun, la interkonsento pri fino de la milito en Vjetnamio estas jam subskribita. Tamen por ke la surpaperaĵo fariĝu realaĵo kaj ĉiuj artikoloj estu perfekte efektivigitaj, estas ankoraŭ bezonataj grandaj klopodoj de ĉiu koncerna flanko. La registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio jam solene esprimis, ke ili rigore plenumos la artikolojn de la interkonsento kaj ĉiuj protokoloj kaj defendos la pacon en Vjetnamio. La popoloj de ĉiuj landoj kaj publika opinio tra la mondo postulas, ke ankaŭ la registaro de Usono kaj la aŭtoritatularo de Sajgono rigore observu la interkonsenton kaj efektive plenumu sian prenititan devon.

Post la fino de la milito en Vjetnamio, laŭpaŝajn solvojn atendas la problemo de politika perspektivo de Suda Vjetnamio kaj tiu de ŝtata reunuigo de Vjetnamio. Hodiaŭ, en Suda Vjetnamio ekzistas du reĝimoj, du armeoj, du regaj regionoj kaj tri politikaj fortoj. Tio estas realaĵo fakte konfirmita jam en la interkonsento. La Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio estas vera reprezentanto de la popolo de Suda Vjetnamio, varme subtenata de ĝi kaj vaste agnoskata internacie. La politika perspektivo de Suda Vjetnamio devas esti decidita de la tri politikaj fortoj en Suda Vjetnamio tra paca interkonsiliĝo, laŭ la reala stato en Suda Vjetnamio, sen interveno de eksteraj armitaj fortoj. La fakto, ke en la pasintaj 18 jaroj, Vjetnamio ne povis ĝustatempe reunuiĝi kaj estis dividita por longa tempo en du partojn sudan kaj nordan, estas ĝuste kaŭzita de la rompo de la Ĝenevaj Inter-

konsentoj de 1954. Tio estas kontraŭ la nacia deziro kaj naciaj interesoj de la vjetnama popolo. La nacio de Vjetnamio estas unuigita nacio kaj la lando de Vjetnamio estas unuigita lando. Ankaŭ tio estas konfirmita en la interkonsento. La reunuigo de Vjetnamio devas esti laŭpaŝe efektivigata de la Nordo kaj Sudo de Vjetnamio per paca maniero, sur la bazo de unuanima interkonsiliĝo kaj sen ia ajn ekstera interveno.

La ĉina popolo kaj la vjetnama popolo estas samfamilianoj. En la komuna batalo la popoloj de niaj ambaŭ landoj ĉiam ku-

raĝigas kaj subtenas unu la alian. Nuntempe la batalo de la vjetnama popolo iris jam en novan stadion. En la estonteco, kiel en la pasinteco, la ĉina popolo kontinue donos firman subtenon al la justa afero de la frata vjetnama popolo. Ni estas profunde konvinkitaj, ke malgraŭ ĉia ajn malfacilo kaj obstaklo renkontotaj sur la vojo dum sia antaŭenmarŝo, la vjetnama popolo certe povos finfine realigi post senlaca persista peno la subliman celon difinitan de Prezidanto Ho Chi Minh: konstrui pacan, memstaran, unuiĝan, demokratian kaj prosperan Vjetnamion.

